Dep. legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

4ª jaro Septembro 1.991 Numero 22 (1)

"ankaŭ en Esperanto..."

"Mi donas ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrinantoj el la tuta mondo en tiu ĉi tago de universala frateco kiu vidas nin unuigitaj kiel idoj de unu sama Patro en la nomo de Kristo, Vero de la Homo".

Tiu ĉi estis la Esperanto-saluto kiun kune kun aliaj en 17 diversaj lingvoj parole adresis la Papo **Johano Paŭlo 2-a** al pli ol **1.400.000 da junuloj** kunvenintaj en **Czestochowa** (Pollando) okaze de la **6-a Monda Junulara Renkontiĝo** la 14-an de Aŭgusto ĉi-jare. Partoprenis ĝin katolikaj junuloj el pli ol 80 landoj (inter aliaj 350.000 poloj, 80.000 sovetianoj... 30.000 hispanoj, ktp.). La aranĝo estis rekte dissendita de multaj naciaj televidoj (ekz. TVE-2) k radioelsendejoj, kaj daŭre atentata de diversaj aliaj amaskomunikiloj; ne malmultaj rimarkigis la uzon unua foje de la Internacia Lingvo fare de la pola Papo.

Venontage, la 15-an de Aŭgusto, kaj je la fino de Sankta Meso celebrita antaŭ la Sanktejo de l´ (Nigra) Virgulino de Czestochowa, kaj kune kun aliaj diverslingvaj "iru pace-oj" la Papo ankaŭ uzis Esperanton tiele: **"Sanktega Maria akompanu vin"**.

Anekdote: La Meso estis samtempe tradukita en 7 lingvoj, kaj la ĉeestantoj pere de specialaj kapaŭskultiloj elektis tiun plej konvena por ili (kvankam ni supozas la kvanto de tiuj "periloj" limigita, kaj certe la partoprenantoj estis pli ol 300.000 !!)

Estis multaj la adjektivoj al tiu ĉi tritaga evento aljuĝitaj de la amaskomunikiloj: plej sukcesa, impona, ... kaj ne hazarde ankaŭ **"babela"**, atentigante tiel pri la lingva ĥaoso kiu regis dum la Renkontiĝo inter tiom multnacia kaj diverslingva partoprenantaro.

ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO

Kvamkan ĉi-jare kun sufiĉe da prokrasto, jen nia estraro kaj laŭ postulas la Asociaj Statutoj kunvokas la tutan anaron de la Grupo Esperantista de Bilbao partopreni la **ĉiujaran ĝeneralan kunvenon**, kiu okazos, **en la sidejo de la Asocio**, je unua alvoko, la Vendredon 27an de Septembro je la 7-a horo vespere.

Pro tio ke je tiu dato, supozeble, ne estos sufiĉe da partoprenantoj, la kunveno okazos, je dua alvoko, **la Sabaton 28-an de Septembro, je la 7-a horo vespere.** laŭ la ĉi-suba tagordo:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de l´ Akto pri la antaŭa ĝenerala kunveno.
2. Same rilate Memuaron pri la jaro 1.990-a.
3. Same rilate financan bilancon de la jaro 1:990-a.
4. Buĝetpropono por la jaro 1.991-a.
5. Parta renovigo de la nuna estraro (vicprezidanto kaj sekretario) kaj aldone, ĉar demisiitaj, la pasintjare ĵus elektitaj Prezidanto kaj Kasisto. Prezentado de la kandidatoj eblas, ĝis la komenco de la kunveno, ĉe la Sekretario S-ro Iñaki Vélez.
6. Novaj publikaĵoj en kiuj kunlaboras nia Asocio: **"Eŭska kverko"** kaj **"Internacia Lingvo"**.
7. Aliĝo de nia Asocio al Eŭska Esperanto-Asocio.
8. Informoj diversaj fare de la estraro.
9. Demandoj kaj sugestoj.

la Grupo ekde Oktobro.

KRISTNASKA LOTERIO jam en

COBRO DE CUOTAS (AÑO 1.991)

Al igual que el año pasado, el pago puede hacerse en cualquier sucursal de la **Bilbao Bizkaia Kutxa**, utilizando el impreso -en parte ya cumplimentado- que se adjunta. Necesario es unicamente que añadas tu **nombre y la cantidad a ingresar** (la cuota anual como miembro de nuestra Asociación es **1.200** ptas.)

Quien no reciba, junto a este número de **"NIA PONTO"**, el impreso para el pago, es que no debe hacerlo en 1.991, por haberlo realizado ya previamente.

Se recuerda que el ingreso ha de hacerse en :

BILBAO BIZKAIA KUTXA

Cuenta corriente nº: **22-1800155-0**

Gracias por vuestra ayuda y apoyo!.

Si el recuadro de la derecha tiene una X en rojo significa que aún tienes pendiente el pago de la cuota del año pasado (1.990). ☐

NOVAJ KURSOJ - NOVAJ KURSOJ

Kiel ĉiujare kaj kiam proksimiĝas Oktobro,jam planas nia Asocio **novajn kursojn** enkondukajn al la Internacia Lingvo. Same kiel kutime okazos ili **en nia sidejo** dum 4 monatoj, du tagoj semajne kaj prefere de 1´ 20a ĝis la 21a horo. Kvankam ankoraŭ ne decidita, supozeble ekde la unua aŭ dua oktobra semajno.

Kaj same kiel ĉiujare, ni bezonas **vian helpon kaj kunlaboron** por **diskonigi la kursojn. KONTAKTU NIN!** Ni havas belajn pri-kursojn afiŝojn kaj por-leterkestojn propagandilojn. Je via mano estas ke ili ne restu en niaj bretoj.

NUEVOS CURSOS EN OCTUBRE. Colabora en su difusión!

****

...kaj memoru, **KONVERSACIA RONDO** okazas ĉe la Grupejo je la 8-a horo vespere **ĉiu jaŭdo.** Rekomendinda por tiuj kiuj finis elementan kurson, progresantoj kaj ĝenerale por kiuj volas plibonigi sian lingvoscion.

****

Publikigita en la angla ĵurnalo **"THE INDEPENDENT"** (4-06-91), kaj poste laŭ la ĉi-suba resuma traduko en la hispana ĵurnalo **"EL PAÍS"** (5-06-91), tiu ĉi artikolo bone ilustras la **lingvan ĥaoson**, kiu nun regas **en la Eŭropa Komunumo**; unuflanke la multlingveco kiun oficiale defendas la Komunumo (ĉiuj la lingvoj de l´ ŝtatmembroj estas ofialaj, samrajtaj) kaj aliflanke la praktika neceso maksimume uzi du **(labor)**lingvoj (fakte la angla kaj la franca) en la plimulto da kunvenoj kaj komisionoj, tiel atencante kontraŭ la **EK**-statuta lingva egalrajteco kaj provokante **pravaj protestaj reagoj**, kiel tiuj de la hispanoj pri kiuj sciigas la artikolo.

Ŝajne, tiun dilemon nur povus solvi adopto de **neŭtrala** (ĉar ne-nacia) internacia lingvo. Ĉu vi, kara esperantisto, konas **TIA**?

LOTERIA DE **NAVIDAD**, ya en el Grupo desde Octubre.

REVISTA DE PRENSA

THE INDEPENDENT

El rompecabezas europeo de lenguas

La arrogancia fue la causante de la torre de Babel. Todos los constructores hablaban la misma lengua en esos días de inocencia, pero cometieron el error de creerse que podían llegar al cielo. El Señor (...) embrolló su lengua y no pudieron entenderse entre ellos. No es sorprendente que dejaran de construir la ciudad. La Comunidad Europea ha reanudado el proyecto, esperando evitar la traba de imposición divina mediante el empleo de multitud de traductores.

Una risita celestial ha debido saludar, por tanto, las últimas noticias sobre una interrupción importante del trabajo de la Comunidad debido a la falta de traductores de español. Los españoles, muchos de los cuales hablan perfectamente inglés o francés, han montado en sus altos caballos y se han alejado de las reuniones en las que no está garantizada la traducción al español.

Esto no es más que una anticipación de problemas futuros. (...) Cuando los escandinavos y los países del este de Europa comiencen a incorporarse a la CE, los problemas de traducción se multiplicarán dramáticamente. Ya en la actualidad, 4.000 de los 12.000 empleados están ocupados en diversos aspectos relacionados con la traducción. (...) Pero el problema central continuará azotando a la CE y acumulando costes. La única tranquilidad es que así el cielo permanecerá a una distancia segura y de esta forma será innecesaria otra intervención divina.

Londres, 4 de junio

EŬSKA KVERKO

ELDONAS EŬSKA ESPERANTO-ASOCIO

N° 1
Marto 1991

Pri la deveno kaj parencoj de la eŭska
sur la 4a paĝo


Scenejo por popolo
sur la 8a paĝo

Eŭska mitologio kaj fabeloj
sur la 10a paĝo

Leizaran kaj amikoj de unusola fenestro
sur la 18a paĝo

Eŭska kino-arto
sur la 7a paĝo

La muzikilo "alboka"
sur la 15a paĝo



korojn: tamen, superstiĉoj. rĉoj, herezoj memorigas al ni la enson de la popolaj kredoj, kiujn uperregantaro atakis ĉefe pro la a enhavo de ili. Sed tio estas emo.

vojaĝu ni denove, nun al la Tie, sub la agrikultura prema- arbaro fine cedis al la kultiva- n plej kvalitan grundon. La ekigas ebenajn terojn, kie plimultiĝas cerealoj kaj transbrilas super la fluanta ro, kies fruktodonegaj bor- ĝis la pasinta jarcento. aj regionoj de la Duonin- mie kaj leĝe, ankaŭ kiam Kastilio (nuntempe, en nuigis parton de Eŭskio

mulistoj ne ripozis por sterajn petojn de pano bena ĵoj ne estis nur o. Ili ebligis rektajn pidecon de komuni- ntro de la Duonin- ropo. Pli ol la eko- nia historio la kul- un tia malfermeco

venis la latinuloj , pova tra pres- Eŭropo antaŭ du netis la geeŭs- jn kiel Irunjo norojn. Fakte, a hispana kaj jn lingvojn. j, la muzul- uroteknikon farroa); la bankistoj urboj; ler- artistoj, r ŝanĝo

p, ĉiam o. Ĝiaj aptajn speris mo- frue nve- ili la

eliron de manufaktura ĵoj. Ŝipe envenis moroj, libroj, ideoj, tiel rapide kiel varoj, sed pli subtile dis- vastigitaj, pere de adaptiĝo al la loka sistemo.

La sperto de la eŭskaj maristoj akompanis Kolombon al Ameriko en la eŭropana eltrova vojaĝo. Ekde la deksesa jarcento, la "Nova Konti- nento" ŝanĝis la vivmanieron en nia lando. El tie envenis la maizo, cere- alo sukcese aklimatigita en la mal- seka areo, kiu maloftigis la ĉeeston de la malŝato sur miloj de malriĉaj tabloj, kaj kunhelpis la loĝantomul- tiĝon.

Rezulte de ĉi-tio elmigris senĉese la geeŭskoj, precize, al Ameriko ĝis la nuntempa okcidenta ekonomia krizo. Kelkaj el ili, filoj de povha- vintoj, trovis riĉa ĵojn kaj honorofi- cojn: la plimulto, simple, esperis ke la nesufiĉon estus restinta sur la forirokajo.


Vere, la ekonomiaj malsamoj estis grandaj inter niaj prapatroj, kvan- kam socie ĉia eŭsko estis nobelo. La ĝenerala nobeleco estis frapanta en feŭdaj socioj, nekutima aliloke, kaj surprizante daŭrema: ĝis 1876, kvankam je tiam la liberalaj prakti- koj jam estis malplenintaj ĝin de senco. El kio devenis tia specialo, kiu samigis ies ajn honoron, ĉu de privilegiulo, ĉu de mizerulo? Res- pondos al ni la Foruoj, eŭskaj ĉar- trajtoj.

Ĉia Foruo estis leĝensemblo por teritorio: el tie venas unu el la kialoj de ekzisto de sep provincoj en Eŭskio. Oni skribis la Foruojn mal- frue aŭ neniam, ĉar oni asertis, ke ili estis bazitaj sur "kutimoj": ilia neprecizita deveno ne gravis por ke oni akceptis ilin kvazaŭ ili estus nepreterlaseblaj por la vivo de la popolo.

Iel pravis tiuj, kiuj tion pensis. La Foruoj certigis la komunuman uzon de arbaroj, paŝtejoj, akvo; ili nodis la komunumajn rilatojn; ili rajtigis la liberan komercon sen pagi doga- nimpostojn, kio riĉigis la komercis- tojn kaj malmultekostigis -almenaŭ teorie- la neprajn varojn. Regulante la geedziĝon kaj la heredon, ili malebligis la perdon de multe da posda ĵoj de la familio. Nuntempe oni deziras reakiri la Foruojn pere de alĝustigo al la realo, ĉar la tradi- cia socio jam estas parto de nia estinto.

Tie finiĝas nia vojaĝo: apud la kverko, simbolo de Eŭskio. Jen sce- nejo por popolo. Nia desegno estas unukolora, statika skizo. Estonte, ni intencas, niaj linioj plenos de vivo.

Keti Sesmero



Unue riĉeginta rezultato de evoluado de tradiciaj produktadoj, la eŭska industrio [illegible] nuntempe la defion de la renovigo (industria areo de [illegible])

EL LA REDAKCIO

Estimataj legantoj.

Pere de ĉi tiu nova revuo, ni intencas plenumi antaŭlongan scivolemon de multaj gesamideanoj de la tuta mondo pri tiu eta sed kurioza popolo, kiu volas nomiĝi Eŭskio (Vaskio), multfoje kaj bedaŭrinde nur diskonita per la sono de la pafiloj.

Do, estu nia ĉefa celo diskonigado de la eŭska realo ekde pluraj vidpunktoj. Tiusence, ni aperigos opiniajn artikolojn pri kiuj kompreneble nur la aŭtoroj mem respondecas. Ni konscias ke tuta neŭtraleco ne eblas; tial ni preferas antaŭsciigi ke en nia revuo ĉiuj opinioj estos bonvenaj, ĉar ĉiuj spegulas iun flankon de la realo.


Kvankam principe ni intencas elteni fikse kelkajn sekciojn (Muzikiloj, Historio, Bestoj kaj plantoj, Lingva, Laste, Mitologio) ni preferus ke ĉi tiu numero estus prova por ke vi mem opiniu pri kiuj temoj vi plej interesiĝas.

Fine, ni klopodos publikigi ĝin tri-monate sed plifoje tio dependas ankaŭ de via kunhelpo (rimarku pri subskriboj). Nun ni simple restas je via dispono kun la espero ke vi reagos pozitive.

EŪSKA KVERKO, tiu ĉi estas la nomo de nova eldonaĵo de Eŭska Esperanto-Asocio kiu verkita esperante **"celas diskonigadon de la eŭska realo ekde pluraj vidpunktoj"** (vidu editorialo/prezenton maldekstre). Kvankam eldonita de **EEA** ĝi ne temas pri Esperanto aŭ E-movado -por tio ekzistas jam aliaj publikaĵoj en nia lando- **Eŭska kverko** informos al la Esperanto-legantoj el la tuta mondo pri ĝeneralaj temoj ĉiam rilataj al Eŭskio: sia historio, lingvo, literaturo, politiko, ekonomio, naturo, ktp. Kiel vi povas vidi, sufiĉe ambicia projekto ĝi estas, pri kiu la tempo diros se sukcesa. La tempo kaj **via kunlaboro** evidente, ĉar kvankam la revuo jam havas sian redaktoron kaj minimuman teamon da fiksaj kunlaborantoj, ĉiam restas necesa kaj bonvena via aktiva partopreno. **Kiamaniere?** Tre facile: ĉu vi regas sufiĉe bone la Internacian Lingvon, ĉu vi pretas verki aŭ traduki artikolojn laŭ tiu amplekssa temaro. **Kontaktu´nin!** La afero vere meritas la penon.

Laŭ aperperiodo **EŪSKA KVERKO** estos trimonata (la unua numero aperis Marte ĉi-jare), havas 20 paĝojn, 30 x 21 cm. formaton kaj vere luksan aspekton.

ABONO
(4 sinsekvaj numeroj):
1.000 ptoj



ESPERANTOA IKASGAI, jen la unua* Esperanta lernolibro eũske verkita, kiun de antaŭ kelkaj monatoj vi povas trovi en multaj librovendejoj de nia urbo. Verkita de samideano **Aitor Arana**, de Legazpia (Gipuzko), la metodon publikigis la eldonejo **HOTS** kaj dank´ al subvencio de la Eũska Registaro, en Decembro de 1990.

Tre bona enkonduko al la Internacia Lingvo, havas la libro 124 paĝojn, 24 x 17 cm. laŭ formato, kaj vere luksan aspekton. Aldone vi trovos en siaj lastaj paĝoj relative ampleksan (28 pĝ) vortaron Esperanto-eũska.

PREZO: 1.000 pesetoj

---

* Kvankam fakte ne lernolibro, la unua priesperanta publikaĵo eũske verkita (en la bizkaja dialekto) estis la **ŜLOŜILO**, kiu aperigita en Bilbao en la jaro 1935 estis diskoniga broŝureto kun elementa gramatika enkonduko kaj vortareto Esperanto-eũske. Ne antaŭ multe nia Grupo reeldonis ĝin senŝanĝe en tre malgranda kvanto, rememore-omaĝe.

EGUNEROKO ESAMOLDEAK

1.- Permesu, ke mi prezentu min.
1.- Utzidazu neure burua aurkezten.
2.- Mia nomo estas Antono.
2.- Nire izena Antton da.
3.- Mi estas Ludoviko.
3.- Ni Koldo naiz.
4.- Mi ĝojas, ke mi vidas vin.
4.- Pozten naiz zu ikusteaz.
5.- Kia feliĉa renkontiĝo!
5.- Hau bai zorioneko topaketa!
6.- Jam de longe mi ne vidis vin.
6.- Aspaldian ez zaitut ikusi.
7.- Tio ne estis mia kulpo.
7.- Hori ez zen nire errua izan.
8.- Kiel vi nomiĝas?
8.- Nola duzu izena?
9.- Mi nomiĝas Helena.
9.- Elena dut izena.
10.- Kion vi opinias pri la mondo?
10.- Ze eritzi duzu munduari buruz?
11.- Pri kio temas?
11.- Zeri buruzkoa da?
12.-Ĉu mi povas fumi ĉi tie?
12.- Erre al dezaket hemen?
13.- Dankon. Mi dankas al vi. Mi dankas vin.
13.- Eskerrik asko. Eskertzen dizut.
14.- Ne dankinde.
14.- Ez horregatik.
15.- Vi estas tre ĝentila.
15.- Oso saloa zara.
16.- Permesate. Malpermesate.
16.- Uzten da. Debekatua.
17.- Envenu (eniru). Sidiĝu, mi petas.
17.- Sar zaitez. Eser zaitez, mesedez.
18.- Vi pravas. Vi ne pravas.
18.- Arrazoia duzu. Ez duzu arrazoirik.
19.- Mi ne havas tempon.
19.- Ez dut astirik.
20.- Mi bedaŭras elkore.
20.- Bihotz-bihotzez sentitzen dut.
21.- Mi estas okupita.
21.- Okupaturik nago.
22.- Bonvolu diru al mi...
22.- Mesedez esaidazu...
23.- Ne ĝenu vin.
23.- Ez ezazu zeure burua molestatu.
24.- Pardonu, ke mi vin ĝenas.
24.- Barkatu nik zu molestatzea.
25.- Lasu min trankvila!
25.- Utzi ni lasai!
26.- Estas senutile.
26.- Alferrikakoa da.
27.- Tio ne valoras la penon.
27.- Horrek ez du merezi.
28.- Mi venas de hejmo.
28.- Etxetik nator.
29.- Aŭskultu min! Atentu!
29.- Entzuidazu! Adi!
30.- Mi donas mian parolon.
30.- Neure hitza ematen dizut.
31.- Mi havas la vorton sur lipo.
31.- Mihiaren puntan dut hitza.
32.-Ĉu vi dormis bone?
32.- Ondo egin al duzu lo?
33.- Mi ĉiam dormas profunde.
33.- Beti egiten dut lo sakon(ki).
34.- Kiam vi ellitiĝas ĝenerale?
34.- Noiz jeikitzen zara normalean?
35.- Mi ĉiam vekiĝas je la 7a, kaj poste mi tuj ellitiĝas.
35.- Beti esnatzen naiz 7etan eta gero berehala jeikitzen naiz.
36.- Kiam vi kutimas enlitiĝi?
36.- Noiz oheratzeko ohitura duzu?
37.- Hodiaŭ mi volus frue enlitiĝi.
37.- Gaur goiz oheratu nahi nuke.
38.- Mi estas tre laca.
38.- Oso nekatuta nago.
39.- Pasintnokte mi plurfoje vekiĝis.
39.- Aurreko gauean hainbat aldiz esnatu naiz.
40.- Veku min je la sepa.
40.- Iratzar nazazu 7etan.
41.- Kie estas la konektilo (saltilo)?
41.- Non dago etengailua?
42.- Bonvolu estingu la lampon.
42.- Mesedez itzali argia.
43.- Kie vi loĝas?
43.- Non bizi zara?
44.- Mi loĝas en la strato "Eŭska Lando".
44.- "Euskal Herria" kalean bizi naiz.
45.- Sur kiu etaĝo vi loĝas?
45.- Zein solairutan bizi zara?
46.- Mi loĝas sur la tria etaĝo.
46.- Hirugarren solairuan bizi naiz.
47.- Sub kiu numero vi loĝas?
47.- Zein zenbakitan bizi zara?
48.-Ĉu estas lifto?
48.- Ba al dago igogailurik?
49.- Bonvolu, skribu al mi vian adreson.
49.- Mesedez, idatzidazu zure helbidea.
50.- Mi estas malsata. Mi havas malsaton.
50.- Goseak nago. Gose naiz.
51.- Mi estas soifa.
51.- Egarriak nago. Egarri naiz.
52.-Ĉu tiu ĉi seĝo estas libera?
52.- Libre al dago aulki hau?
53.- La salujon, bonvolu.
53.- Gatzontzia, mesedez.
54.- Kelnero, du tasojn da kafo!
54.- Zerbitzari, bi (kikara bete) kafe!
55.- Vere, la kafo estas bonega.
55.- Benetan kafea oso ona dago.
56.- Mi trinkas la kafon kun sukero (sen sukero).
56.- Azukrearekin (azukrerik gabe) edaten dut kafea.
57.-Ĉu vi fumas? Ne, mi ne fumas.
57.- Erretzen al duzu? Ez, ez dut erretzen.
58.-Ĉu vi havas fajron?
58.- Ba al daukazu zurik?
59.- Prenu mian fajrilon.
59.- Tori (hartu) nire pizkailua.
60.- Donu al mi skatolon da alumetoj.
60.- Emaidazu pospolu-kaxa bat.

NAZIOARTEKO HIZKUNTZA

INTERNACIA LINGVO

IDIOMA INTERNACIONAL

1. urtea | MAIATZA - 1991 | 1. zenbakia


EUROPAKO ELKARTEAN BADITUGU:

AMANKOMUNEKO TXANPONA,
AMANKOMUNEKO MERKATUA,
AMANKOMUNEKO LEGEBILTZARRA,
ZERGATIK EZ AMANKOMUNEKO HIZKUNTZA?

Languas en la Comunidad Europea. Algunas de las cuales aún luchan por su existencia.

★ ★ ★

Europako Elkarteko hizkuntzak. Zenbaitzuk, oraindik bere izatearen alde borrokan diharduenak.



EN LA COMUNIDAD EUROPEA TENEMOS:

UNA MONEDA COMÚN,
UN MERCADO COMÚN,
UN PARLAMENTO COMÚN,
¿POR QUÉ NO UN IDIOMA COMÚN?

HERRI BAKOITZAT BERE HIZKUNTZA ETA ESPERANTOA DENONTZAT

CADA PUEBLO CON SU IDIOMA Y EL ESPERANTO PARA TODOS.

Estas **INTERNACIA LINGVO** nova publikaĵo kiu eldonita de Eũska Esperanto-Asocio (t.e. Alava E-Asocio kaj nia E-Grupo inter aliaj) **celas diskonigadon de la Esperanta realo inter la neesperantista publiko de Euskio.** Verkita dulingve (eũske kaj hispane) kaj distribuita senpage en Biskajo, Gipusko, Alavo kaj Nafaro al diversaj politikaj institucioj, kulturaj asocioj, amaskomunikiloj (ĵurnaloj, radioelsendejoj, ...), ktp., enhavas **INTERNACIA LINGVO** sciigojn variajn pri la loka kaj internacia E-Movado kaj prilingvajn artikolojn ĉiam rilataj al la nuna evidenta neceso de komuna internacia lingvo kiel Esperanto.

Similajn informajn bultenojn (kaj kelkfoje tutajn revuojn) de antaũ multe kaj samcele eldonas diversaj naciaj kaj regionaj Esperanto-asocioj.

Pri la aperperiodo, ni planas ke **INTERNACIA LINGVO** estu trimonata (4 numeroj jare). De tiu ĉi unua numero, okpaĝa (vidu supre la unuan), ni eldonis 700 ekzemplerojn.